

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA  
kaj de PATRONA ASOCIO „LEXICON SILVESTRE“ R.A.

Nr. 52 Eberswalde, 2005-12-01

---

1. Informo pri la membrokunveno de "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r.A." je 2005-10-07  
Komenco 14.10 h. en la Alternejo Eberswalde, Ruĝa Domo, ĉambro 53  
La protokolon de la membrokunveno vi trovos kiel aldonaĵon 1.
2. Informo pri la preleg-aranĝo "Forstfaka terminologia laboro 2005" je 2004-10-07 16 h.  
en la Faklernejo, Alte Akademie  
La aranĝo denove estis aranĝita kune kun "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r.A., IFRE kaj Ebersvaldea Kulturligo r.A.Ĉeestanta: D-ro. Simon, d-ro. Dannroth, d-ro Weckwerth, d-ro Götz, s-ro Vašiček (Ĉeĥio), s-ro Bloch, s-ino Meyer.  
  
D-ro Simon dankis al la Faka Altlernejo Eberswalde pro la disponigo de lekcisalono kaj poste d-ro Dannroth direktis la aranĝon. Oni aprobis la ŝanĝitan tagordon:
  1. Jaromír Vašiček: Al la nacia forstprogramo de la Ĉeĥa Respubliko
  2. Ralf Block: Evoluigo de daŭre uzeblecaj terekpluat-sistemoj en la norda de la prefektujo Njuĵiang Provinco Yuannan/ Popola Rrepubliko Ĉinio)
  3. K.-H. Simon, H. Weckwerth, K.-P. Weidner: Ideoj pri la estonta forst-terminologia laboro
- 2.1 Jaromír Vašiček: Al la nacia forstprogramo de la Ĉeĥa Respubliko  
Prelego en angla lingvo kun PP prezentado.  
La forstmastrumado skribas "nigrajn nombrojn".  
Klarigoj al la certigigo, al la forstaranĝado kaj la sanstato de la arbaroj (v. ald. 2).
- 2.2 R. Bloch: Evoluigo de daŭre uzeblecaj terekpluat-sistemoj en la norda de la prefektujo Njuĵiang (Provinco Yuannan/ Popola Rrepubliko Ĉinio) Prelego kun komputoraj bildoj, indikoj sur la konvencio pri biodiverseco 1992. (v. ald. 3).
- 2.3 K.-H. Simon, Horst Weckwerth, K.-P. Weidner: Ideoj pri la estontaj forstterminologiaj laboroj. Prelego de d-ro Simon, ĉe kio ĉefe estas prezentitaj la progresoj kaj la problemoj en la unuopaj fremdlingvoj (v. ald. 4). Poste oni daŭrigis la paroladojn en societema kadro.
3. Invito al la preleg-aranĝo "Forstfaka terminologia laboro 2006"  
Nin invitas vin al la tradicia aranĝo de la Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r.A. La kunveno servu al la interŝanĝo de spertoj ĉe la laboro pri la "Lexicon silvestre" kaj sin informi pri forstfakaj problemoj, kiuj interesas trans landlimoj.  
Datumo: 06. Oktober 2006 15 Uhr.  
Loko: Prelegsalono en la Alte Akademie, Schicklerstr. 3, de la Fakalternejo Eberswalde.
4. Varbado pri asocianoj kaj donacoj  
Estas ĝojige, ke ni povis je 2005-10-07 akcepti du novajn membrojn, sed ni bezonas ankoraŭ pluajn aktivajn patronojn, kiuj varbu por la Ls-projekto.  
Ĉar ni ne intencas plialtigi la prezojn por niaj produktoj kaj la membrokotizojn, ni petas Vin subteni estonte la laboron per donacoj.

5. Librooferto

Ekde la oferto en FI 50 ni eldonis la jenajn volumojn:

**(Wörterbuch des Forstwesens in Deutsch)**

Prezo: EURO

**„Lexicon silvestre, Okta pars“**

Wörterbuch des Forstwesens

Deutsche Version (VIII/de/1) mit Definitionen. X, 148 p. (2005) (Gb) 48,00

(VIII/de/1) „ „ X, 148 p. (2005) (Ringh) 38,00

**(Wörterbuch des Forstwesens in Französisch)****„Lexicon silvestre, Sexta pars“**

Dictionnaire de foresterie

Version française (VI/fr/1) avec définitions. X, 150 p. (2005) (Gb) 48,00

**(Wörterbuch des Forstwesens in Tschechisch)****„Lexicon silvestre, Quinta pars“**

Lesnický slovník

Česká verze (V/cs/1) s definicemi. X, 156 p. (2005) 96-0(Gb) 36,50

(2005) 97-9(Ringh) 26,50

Ni dankas ĉiujn kunaŭtorojn kaj simpatisantojn de la Ls-projekto pri viaj ĝisnunaj klopodoj pri la varbado por nia projekto kaj por la disvastigo de libroekzempleroj. Ni petas vin ankoraŭ pli forte kiel ĝis nun subteni la centralon ĉe la vendado de libroj, por plimalgrandigi la stokon da presitaj Ls-ekzempleroj. Ni kompensas vian penadon per partopreno en la vendadenspezo – ĝi ja jam ĝis nun apenaŭ kovras niajn elspezojn. Ni petas ĉiujn kunaŭtorojn informi nin pri via deziro por liverado de aŭtor-ekzemplero, ĉar ni ekde la jaro 2003 pro la financa situacio de nia asocio ne plu kvazaŭ aŭtomatike transdonis tian volumon al rajtigitoj. Laŭdezire ni sendos partojn de Ls kiel dataon per e-mail. Al asocioj de „Patrona Asocio ‚Lexicon silvestre‘ r.A.“ ni povas doni rabaton ĝis 50 %. Ankaŭ por Ls-volumojn, kiuj vi mem vendas, donas al rabaton. Per la vendado de Ls-volumojn vi progresigas la internacian interkompreniĝon.

6. Pri la uzado de „Internet“

Por kelkaj ricevantoj de „Forstista Informilo“ ni jam povis uzi „Internet“, ĉar aŭ ili mem proponis tion aŭ ni konas ilian e-mail-adreson. Ni intencas en la estonteco uzi pli vaste tiun ĉi komunikadan rimedon, por mallevigi la ŝarĝadon de la Patrona Asocio pro la preparo de la paperaj ekzempleroj kaj la ekspedado. Tial ni petas vin informi nin pri via e-mail-adreso sed ankaŭ pri tio, ĉu vi plu preferas ricevi paperan ekzempleron.

7. Al la pagado de la membrokotizo

Ni petas vinĉ testi, ĉu vi jam pagis vin jarkotizon – ĝi sumiĝas je decido de la membrokunveno de 12.10.01 nun 15 Euro.

Ankaŭ malgrandaj donacoj helpas nin, certigi la likvidecon de la asocio.

En la kotizregularo de la asocio estas dirita:

“ La kotizo estas pagendo je la 31a januaro de la iranta jaro.

Ni rekomendas la regule kotizpagon per daŭra mendo al la concerna kaso.

Por ĝirado de membrokotizoj kaj financaj donacoj:

Kontonumero: 39 010 88 104; banknumero: 17 052 000; Sparkasse Barnim en

Eberswalde.

**La Direkcia Konsilio de la „Förderverein“ dankas al ĉiuj kunagantoj pro la laboro plenumita de ili kaj deziras al ili kaj iliaj familianoj sanon kaj kreadan potencon dum la**

**nova jaro.**

**Aldonaĵoj:**

Pro financaj kaŭzoj la prelegoj povas aperi nur resume. Interesitoj povas mendi kopion de la kompletaj prelegmanuskriptoj ĉe Patrona Asocio "Lexicon silvestre" .r.A. en Eberswalde aŭ ĉe la aŭtoroj .

- 1) Protokolo de la membrokunveno je 2005-10-07
- 2) Jaromír Vašíček: Al la nacia forstprogramo de la Ĉeĥa Respubliko
- 3) R. Bloch: Evoluigo de daŭre uzeblaj terekpluat-sistemoj en la norda de la prefektujo Nujiang (Provinco Yuannan/ Popola Respubliko Ĉinio)
- 4) K.-H. Simon, H. Weckwerth, K.-P. Weidner: Ideoj pri la estonta forst-terminologia laboro

**Feliĉan Novjaron**

---

**Herausgeber:**

Förderverein „Lexicon silvestre“ e.V., Eberswalde. Adreso: Fachhochschule Eberswalde, Bibliothek, Friedrich-Ebert-Straße 28, DE-16225 Eberswalde.

**Redaktoro:** Dr. Karl-Hermann Simon (KHS)

Carl-von-Ossietzky-Str. 21, DE-16225 Eberswalde. Tel. +49-3334-22154

<khsimon@fh-eberswalde.de> Ne signitaj tekstoj devenas de la redaktoro.

<http://www.fh-eberswalde.de/info.htm>

Aldonaĵo 1

Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.

- Direkcia Konsilio -

**Protokolo  
de la membrokunveno je 2005-10-07  
en Eberswalde, Schicklerstr. 3, . sal. 53**

Komenco de la kunveno: 14.10 h

Ĉeestantoj: D-ro Dannroth, d-ro Götz, d-ro Simon, s-ro Vašíček;  
D-ro Weckwerth,

Sin senkulpigis: S-ino Blanke, s-ino Meier, s-ino Morgenstern, S-ino Reimann

Estro de la kunveno, d-ro Simon, laŭ decido de la Direkcia Konsilio.

Proponita tagordo:

1. Bonvenigo kaj malfermo
2. Konstato pri decidrajto kaj akcepto de la tagordo
3. Decido pri la akcepto aŭ rifuzo de deklaroj pri membriĝo
4. Akcepto de la jarraporto 2003 de la direkcia konsilio
5. Raporto de la kasrevizorino
6. Senŝarĝigo de la direkcia konsilio
7. Elekto de la direkcia konsilio kaj elekto de la kasrevizoro
8. Kromaj problemoj

Al 1: D-ro Simon malfermis la kunvenon kaj salutis la ĉeestantojn.

Al 2: Konstato, ke la kunveno estas laŭorde kunvokita kaj estas decidrajta. Konstato de la tagordo.

Al 3: La deklaron pri membriĝo de s-ino Zercher kaj s-ro Zercher oni ankceptis unuanime. Tiel la asocio

denove havas 39 asociojn

Al 4: La jarraporto 2002, jam publikigita en "Forstista Informilo" estis aprobita sen diskuto.

Al 5: La kaskontrola raporto de la kasrevizorino estis voĉlegita kaj estis aprobita sen diskuto.

Al 6: La Direkcia Konsilio estis unuanime senŝarĝigita per voĉdono.

Al 7: Oni elektis d-ron Dannroth kiel gvidanton de la elekto kaj d-ron Weckwerth kiel balot-asistanton.

Ekzistis la sekva listo pri kandidatoj:

D-ro Götz, s-ino Reimann, d-ro Simon, s-ro Weidner, d-ro Weckwerth.

Por la kasrevizorino s-ino Henze kaj kiel dua s-ino Hafemann kandidatis.

Okazis sekreta baloto per balotiloj.

Oni donis 5 validajn voĉojn.

Ĉiuj gekandidatoj ekster s-ino Reimann ricevis la tutan voĉnombron kaj do validas kiel elektitaj. S-ino

Reimann ricevis 4 voĉojn. La Direkcia Konsilio kaj la kasrevizoroj estis elektitaj

Al 8: Ne ekzistis problemoj.

Fino de la kunveno: 14.30.

Protokolinto: D-ro Weckwerth

## Aldonaĵo 2

### **Al la nacia forstprogramo de la Ĉeĥa Respubliko Jaromír Vašíček Resumo**

La Ĉeĥa Respubliko apartenas al la arbariĉaj landoj de Eŭropo. La forsta mastrumareo sumiĝas al 2,6 Mil. ha. La arbarizec-procento estas ĉ. 33,4. Ekde 1960 ege pligrandiĝis la arbarareo per la forstizo de nekultivitaj agrokulturaj areoj.

Post la finigo de la restitutaranĝoj estas 63,4 % en la posedeco de la ŝtato. La komunumoj kun ĝia arbarkooperativoj resp. arbarasocioj posedas 14,5 %, la privataj proprietuloj 22,1 % de la arbaroj. 76,7% de la tuta arbarareo estas mastrumarbaroj., 19,8 % estas arbaroj por aparta determino kaj 3,5 % estas ŝirmarbaroj. 25,3 % de la tuta arbarareo havas specialan ŝirmstaton. En la estinteco oni aspiras arbospecian distribuon kun la celo, plialtigi la lignorikolton kaj kontentigi la postulon pri merkateblaj arbospecioj

La plialtigo de la produktipoveco konvenas ankaŭ la ĉiujara arfaligaĵkvanto. Ĝi sumiĝas nun ĉ. 14 Mio. m<sup>3</sup>, per tio ĝi estas en Ĉeĥio po loĝanto kaj ha de la arbarareo super la tuteŭropa mezuro.

La uzado de la hejma lignoresursoj per prilaborado kaj konsumo de lignoproduktoj estas ege malataj. Konvertita en krudligno-ekvivalentojn estas eksportata pli ol la duono de la rikoltita ligno forme de krudligno aŭ duonvaroj (segita ligno kaj krudcelulozo). La plej malbona situacio ekzistas sur la kampo de la produktado kaj konsumo de papero kaj kartono. La evoluo de modernaj instalaĵoj por lignoprilaborado kaj

paperproduktado orientigas sin ĉe komence forta partropreno de eksterlanda kapitalo, speciale sur la ligno- kaj paperduonproduktoj kun alta kvoto da krudmaterialo kaj malalta valorkreado.

La sanstato de la arbaroj en la Ĉeĥa Respubliko estas ne kontenta. Ĝi estas speciale karakterizita per la sekvoj de alta imisiŝarĝo, malfortiĝo de la arbarstabileco kaj tro alta ĉasaĵa populacio kaj ties malfavora distribuo de la seksa rilato kaj aĝostrukturo.

La arbarmastrumado ene de unuopaj proprietkategorioj kaj ankaŭ la mastrumadaj aktivecoj de aliaj entreprenferoj de la forstmastrumado jam montras relative bonajn ekonomiajn rezultojn. La kaŭzoj estas la konsiderinde altaj krudmaterialprezoj, kaj la kompare al la EU-mezvaloro provizore ankoraŭ malaltaj produktadprezoj.

La subteno de la forstmastrumado kadre de la disponeblaj monrimedoj de la ŝtata vivmedia fonduso havis ĝis nun nur malaltan signifon.

### Aldonaĵo 3

#### **Evoluigo de daŭre uzeblecaj terekpluat-sistemoj en la norda de la prefektujo Nujiang (Provinco Yuannan/ Popola Respubliko Ĉinio)**

##### **Resumo**

R. Bloch- Eberswalde

La konvencio pri biodiverseco estas grava instrumento por la evoluig-kunlaboro, ĉar ĝiaj celoj kaj enhavoj liveras eminentan kontribuon al la malpliigo de la malriĉeco. La praktika realigado de la konvencio parte okazas per projektoj kiel ekz. per la projekto: Tuto de agadoj pri la biologia diverseco en la norda parto de la prefektujo Nujiang. Je la antaŭo de la projekto staras la optimigo de la ter-ekspluatado per partnera planado de la terekpluatado kaj monitorado de la biodiverseco. Longtempe estu plivalorigotaj la uzareoj, karakterizita per ter-erozio kaj degraditaj sekundararbaroj helpe de agro-arbarkultur-sistemoj kaj produktad-teknologioj de la ekologia terkultivado. Per tio pliboniĝos la enspezokondiĉoj de la lokoj agrikulturistoj kaj malpliĝos la ekspluatpremo sur la lokajn natur-rezervejojn. La prelego estis subtenita per impresaj bildoj el la reserĉregiono

### Aldonaĵo 4

#### **Ideoj pri la estonta forst-terminologia laboro ekde autuno 2005**

Karl-Hermann Simon, Horst Weckwerth, Klaus-Peter Weidner, Eberswalde

Dum la pasinta jaro ekde nia prelegkunveno en oktobro 2004 ni kontinue daŭrigis la laboron pri "Lexicon silvestre" (Ls).

Post la eldono de "Septa Pars" en la lingvoj germana kaj Esperanto antaŭ unu jaro ni plu preparis la eldonon de "Okta Pars" por tiuj ĉi ambaŭ lingvoj. Nun ni povas prezenti la volumojn. Helpo ĉe tiu ĉi laboro estis la aprobo de nia propono al la laboroficejo pri du "unu-Eŭro-ĵoboj" ekde 21a de marto 2005. La ambaŭ al ni asignitaj longtemp-senlaboruloj, s-ino Schwendig kaj s-ino Höhndorf, sin dediĉis post certa enkoduk-tempo per pripensado kaj engaĝo al la por ili nova agadkampo. Ni povis fari la proponon, ĉar ni antaŭe ĝustatempe dum interparoladoj kun la estraro de la altlernejo ricevis promesitan ĉambro post la forloĝiĝo de la Germana Entomologia Instituto. Por tio ni elkore dankas al la prezidanto s-ron prof. Vahrson kaj ĝia kanceliro.

Ankaŭ la subteno de iliaj kunlaborantoj por la aranĝo de la ĉambro per ŝrankoj kaj Internet-konekto helpis nin. Nuntempe tio ne plu estas memkompreneblaĵo, kiam ni ĉie estas ĉirkaŭitaj de burokrataj hurdoj.

La diligento de niaj kunaŭtoroj ebligis presi je la jarfino 2004 la kvaran parton de la ĉeĥa Ls-version kaj en majo 2005 la kvinan parton. D-ro Simon povas senpere konvenikiĝi dum sia vizito antaŭ kelkaj jaroj pri la aktiveco de la kolegoj en Brno. S-ro Moudrý, kun kiu ni havas e-mail-kontakton pere de Ing. Foltanek, demandis antaŭ nelonge, ĉu eblas la partopreno de kolegoj el Brandýs nad Labem en nia ĉi-jara prelegaranĝo. Ni respondis, ke ni antaŭĵojas saluti ilin kiel gastoj en Eberswalde.

Okaze de ekskurso de la Brandenburga Forstasocio al Francio ni povis transdoni kelkajn germanajn kaj francajn Ls- volumojn al la biblioteko de la forsta altlernejo en Nancy. S-ro Jacques Maheut, nia super 80jaraĝa kunlaboranto, estis je tiu ĉi tempo en ferioj. Sed estis preparitaj la kontaktoj kun s-ro prof. Keller, profesoro por forstutiligo kun bona scioj de la germana lingvo de ENGREF, la forstfaka altlernejo en Nancy. La interparoladoj rezultigas, ke li estonte kunlaboros en la Ls-projekto. La franca "Sexta pars" manuskripte de s-ro Maheut kaj plue prizorgita de d-ro Weckwerth nun ni povas prezenti. Ĝi pruvas la kontinuecon de la Ls-projekto.

La Esperanto-version ree reviziis s-ro Gädicke kaj s-ro Ullrich nun havas ĝin por la fina kontrolo.

Jam ni preparas la dataojn por la 9. parto. Ĉifoje ni intencas atingi per frutempa sortado de la nociartikoloj laŭ FDCE-nombroj, ke ni ĝustatempe povas ekkoni ripetojn de jam ekzistaj nocioj kaj povas forigi ilin. Tiel estos evitata postajn ekestantaj breĉojn en la numerado. Kun d-ro Dolacis, Riga, ni havas pluajn kontaktoj, por povi lasi presi baldaŭ "Prima pars" en latvia lingvo.

La kontaktoj al s-ro Walter Vaughan el Nikaraguo, kiu troviĝas en Eberswalde por la preparo de Bachelor-laboro donis ĝis nun ne sufiĉan rezulton rilate kontrolo de la hispana versio.

Ni klopodis por gajni novajn membrojn por la "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre'". Novaj membroj estas unuavice gravaj por la enhava subteno de la Ls-projekto. Sed ankaŭ ĉiu membrototizo kaj ĉiu mondonaco helpas nin en niaj financaj malfacilaĵoj, por ke la projekto ne fiasku. Subtenon de politikistoj, disponantaj pri mono ni ne baldaŭ povos esperi por nia scienca fundamenta esplorado. Kiel fak-kunlaborantojn ni gajni en la lastaj 12 monatoj tri germanajn forstistojn.

Al la situacio ĉe aliaj lingvoversioj:

Je la pinto ĉe la eldonado de tiuj ĉi lingvoversioj plue troviĝas, aparte de la germana kaj Esperantanto, la franca versio. Eble ni sukcesos ankoraŭ ĉijare eldoni Sexta pars. S-ro Maheut senlace laboras.

En Zagrebo, Kroatio, laboras la profesoroj Borzan kaj Glavač pri la realigo de kvarlingvaj licenc-eldonaĵoj de pluaj partoj de la Ls kaj en Voroneŝo, Ruslando, prof. Arefjev pri plurlingva eldono inkl. rusa. Bedaŭrinde mankas por tiuj ĉi eldonaĵoj ankoraŭ la angla versio de „Tertia pars“.

### **Estas tre malfacile trovi por tio kunlaborantojn. Ni bezonas, ni akcentas, libervole, honorofice laborantaj kunagantojn por la angla.**

Prof. Kandy, Indio, kiu jam finkontrolis la anglan version de „Sekunda pars“ nun estas preta kontroli la krudtradukon de „Tertia pars“, farita de d-ro Weckwerth.

Ni havas vastefiksitan celon: Post la eldono de la unuaj versioj de la deka parto sekvos interprodukto. La tiam eskzistantaj volumoj en germana kaj Esperanto lingvoj estos unigataj respektive en unu volumon. Per tiu ĉi farita anonco sed ni ne volas atingi, ke nia vendo de unuopaj volumoj malpliĝas. Ĝi jam nun estas efektiva nesufiĉa por la konservado de nia likvideco de nia lexicon-asocio.

Publikigoj por la varbado de nia Ls okazis en la lasta tempo en la „Brandenburgischen Forstnachrichten“, en „Forst und Holz“ kaj en „Interlinguistische Informationen“.

Je la „tagoj de la malferma pordo“ de la altlernejo Eberswalde ni ĉiam prezentiĝis per postero.

S-ro Weidner instalas por ni «home-page» sub la nomo „www.Lexicon-silv.de“. «Shop» al tiu ofertas

al interesuloj simplan eblecon de mendo por nia publicaĵoj.

Nia ĉefa tasko restos, sekurigi la pluekziston de la Ls-projekto. Tion ni realigu:

Unue per tio, ke ĉiuj kunaŭtoroj konservu la senton, ke ilia kunagado estas bezonata. Baldaŭ ni transdonos al ili la proponojn por la sekvaj nociodifinoj. Tiam ankaŭ estos videblaj la breĉoj, kies plenigo bezonas ilian kunlaboron.

Due per tio, ke ĉiuj kunaŭtoroj ĉiam denove ekscias, ke la Ls-laboro liveras elstarajn rezultojn. Tion ni atingos per la eldono de pluaj Ls-volumoj kaj de la planita CD „Lexicon silvestre“. Tion ni atingos per artikoloj en fakrevuoj, per varbado por la Ls-projekto uzante ĉiajn ajn okazojn. Ekzemplodona estas la prezentado de la Ls dum la stud-enkondukoj por la novaj studentoj, kiel ĝin faris Prof. Heinz Frommhold.

Ni dankas al ĉiuj kunbatalantoj pro ilia ĝisnuna engaĝiĝo kaj rigardas optimisme en la estontecon.